

VERCORS

Zoo ou l'Assassin philanthrope

VERKORO

Zoo aŭ la filantropa murdinto

PERSONNAGES		PERSONOJ	
DOUGLAS TEMPLEMORE	BULBROUGH, médecin légiste	DUGLASO TEMPLOMORO	BULBROFO, jurmedicinisto
DOCTEUR FIGGINS	LE PRÉSIDENT DU JURY	DOKTORO FIGINSO	LA PREZIDANTO DE LA ĴURIO
INSPECTEUR MIMMS	VANCRUYSEN, homme d'affaires	INSPEKTORO MIMSO	VANKRUJSENO, aferisto
SYBIL GREAME	PROFESSEUR KNAATSCH, paléontologue	SIBILO GRIMO	PROFESORO KNAĈO, paleontologo
SIR ARTHUR DRAPER, juge		LORDO ARTURO DRAPO, juĝisto	
LE MINISTRE DU HOME OFFICE	Un juré presbytérien Une petite dame quaker	LA MINISTRO DE HOME OFFICE ¹	Presbiteriana ĵuriano Kvakera sinjorineto
LADY DRAPER	Un ex-colonel des Indes	LORDINO DRAPO	Ekskolonelo de la brita Hindio
JAMESON, avocat de l'accusé	Un juré cultivateur	ĜEMSONO, advokato de la akuzato	Kulturista ĵuriano
MINCHETT, procureur	Un gentleman distingué	MINĈETO, prokuroro	Delikata ĝentlemano
CUTHBERT GREAME, anthropologue	Une autre dame juré Greffier, policemen, clerics	KAFBERTO GRIMO, antropologo	Alia ĵuriana sinjorino Ĵuraktisto, policistoj, notarihelpistoj
LE PÈRE DILLIGHAN, bénédictin		PASTRO DILIGANO, benediktano	
PROFESSEUR KREPS, géologue		PROFESORO KRABO, geologo	

¹Ministerio de la internaj aferoj de la Unuiĝinta Reĝlando.

NOTE

Le nombre nécessaire des comédiens à engager peut être éventuellement réduit de vingt-trois à quinze. La séquence des scènes permet effectivement à un même acteur de tenir plusieurs rôles successifs - à condition que les membres du Jury (comme ce fut le cas au T.N.P. en 1964) ne soient pas présents sur scène dès le début du procès.

DISPOSITION SCÉNIQUE

Quelques éléments simples représenteront l'essentiel d'une cour de justice, en l'espèce la cour criminelle britannique de Old Bailey, à Londres.

Certains témoignages commencés à la barre du tribunal se poursuivront en « flash-back » sur le devant de la scène, les acteurs étant alors isolés, dans un cercle de lumière, du reste du tribunal. Celui-ci, toutefois, tout en s'effaçant dans la pénombre, devra rester suffisamment visible pour qu'il soit apparent que c'est bien la suite du même témoignage que les juges écoutent.

Quand au contraire, au cours d'autres tableaux, l'action se déroulera hors de la vue du tribunal (à Sunset Cottage, dans le cabinet du juge, au Muséum), le tribunal devra s'effacer tout à fait dans une obscurité complète.

NOTO

La necesa dunginda nombro de aktoroj povas eventuale esti limigita de dudek tri al dek kvin. La scena sinsekvo efektive ebligas al sama aktoro ludi plurajn sinsekvajn rolojn - kondiĉe ke la ĵurianoj (kiel tio okazis en T.N.P. en 1964) ne ĉeestu sur scenejo jam de la komenco de la proceso.

SCENA ARANĜO

Kelkaj simplaj elementoj figuros la esencon de kortumo, ĉi tie la brita krimkortumo de Oldbelejo² (angle *Old Bailey*), en Londono.

Iuj atestadoj komencitaj ĉe la tribunala baro plu daŭros per retromemoroj sur la antaŭa parto de la scenejo, dum la aktoroj estos izolitaj, per luma cirklo, disde la resto de la tribunalo. Tiu ĉi, tamen, kvankam svenanta en la duonlumo, devos resti sufiĉe videbla por ke oni komprenu ke la ĵuĝistoj aŭskultas la sekvon de la sama atestado. Kiam, male, dum aliaj sceneroj, la ago okazos ekster la vido de la tribunalo (en <Sunset Cottage>, en la juĝista oficejo, en Muzeo), la tribunalo devos tute sveni en kompleta mallumo.

2 Oldbelejo : Mezepoka kastelo kie ankoraŭ nun funkcias la centra krimkortumo de Londono

ACTE I
PREMIER TABLEAU

À Sunset Cottage. (Le tribunal est invisible). Lumière sur un berceau. Douglas Templemore marche de long en large.

*Un temps assez long. Sonnerie au-dehors.
Douglas va à la rencontre du visiteur.*

DOUGLAS : Le docteur Figgins, je suppose ?

FIGGINS (*vieux et atrabilaire*) : Qui voulez-vous que ce soit à cinq heures du matin ?

DOUGLAS : Vous m'excuserez, docteur, mais le cas est assez grave.

FIGGINS : Je l'espère bien ! Se faire tirer du lit à une heure pareille ! Où est notre malade ?

DOUGLAS (*il lui retire son manteau*) : C'est moi qui ai besoin de vous, docteur.

FIGGINS : Mais vous n'êtes pas de mes pratiques, monsieur... heu... ?

DOUGLAS : Templemore. Douglas Templemore. Non, en effet.

FIGGINS (*fourrageant dans sa trousse*) : Nouveau dans le pays ?

DOUGLAS : Oui. J'habite Londres ordinairement.

FIGGINS : C'est ça. Nous finirons par être complètement

UNUA AKTO
UNUA SCENERO

En Sunsubira Farmdometo³. (Tribunalo estas nevidebla). Lumo sur lulilo. Douglaso Templomoro paŝas tien kaj reen.

Iom longa tempo. Sonoro, ekstere. Duglaso iras renkonti la vizitanton.

DUGLASO: Doktoro Figinso, mi supozas?

FIGINSO (*maljuna kaj malbonhumorema*): Kiu lau vi tio povus esti je la kvina matene?

DUGLASO: Vi pardonu min, doktoro, sed la kazo estas sufiĉe grava.

FIGINSO: Mi ja esperas tion! Esti ellitigita je tia horo! Kie estas nia malsanulo?

DUGLASO (*Li demetas lian mantelon*): Vin bezonas mi mem, doktoro.

FIGINSO: Sed vi ne estas el mia klientaro, sinjoro, hm...?

DUGLASO: Templomoro. Duglaso Templomoro. Ne, efektive.

FIGINSO (*febvre serĉante en sia laborsaketo*): Ĉu novulo ĉi tie?

DUGLASO: Jes. Mi ordinare loĝas en Londono.

FIGINSO: Estas tiel. Nin fine tute

envahis par les gens de la ville. Enfin (*il se passe au cou son stéthoscope*). Déshabillez-vous.

DOUGLAS : Est-ce bien nécessaire ?

FIGGINS : En voilà une question ! Êtes-vous malade ou non ?

DOUGLAS : Je me porte à merveille, docteur.

FIGGINS : Mais alors... Bon Dieu ! que fais-je ici ? À quatre heures du matin ! Et par ce temps de chien encore !

DOUGLAS : Si vous voulez bien approcher, docteur...
Il le conduit au berceau.

FIGGINS : Ah... C'est donc cet enfant. Parfait, parfait. (*Il se penche.*) Quand est-il né ?

DOUGLAS : Hier après-midi.

FIGGINS (*raide*) : Vous ne m'avez pas appelé pour l'accouchement.

DOUGLAS : Il est né en clinique, docteur.

FIGGINS (*radouci*) : C'est son droit, c'est son droit. (*On le voit examiner l'intérieur du berceau, relever la tête, surpris, user du stéthoscope et se redresser perplexe. Il se tourne vers Douglas et le considère un moment d'un air qui exprime à la fois blâme et compassion.*) Je crains fort, monsieur... hm...

DOUGLAS : Templemore.

FIGGINS : Oui... que vous ne m'avez fait venir un peu tard.

DOUGLAS (*très calme*) : Je le sais bien, docteur.

FIGGINS : Comment ?!

DOUGLAS : Il y a près d'une heure que cet enfant est mort.

FIGGINS : Et c'est seulement maintenant que vous me faites venir ?

invados la urbanoj. Do (*li metas sian stetoskopon cirkaŭ la kolon*). Malvestu vin.

DUGLASO: Ĉu tio estas vere necesa?

FIGINSO: Kia demando! Ĉu vi estas malsana aŭ ne?

DUGLASO: Mi mirinde bone fartas, doktoro.

FIGINSO: Sed do... Pro Dio! Kial mi estas ĉi tie? Je la kvara matene! Plue dum tiu hundaĉa vetero!

DUGLASO: Bonvolu proksimiĝi, doktoro...
Li alkondukas lin al la lulilo.

FIGINSO: Ha... Temas do pri tiu infano. Perfekte, perfekte. (*Li kliniĝas.*) Kiam ĝi naskiĝis?

DUGLASO: Hieraŭ posttagmeze.

FIGINSO (*rigida*): Vi ne vokis min por la akuŝo.

DUGLASO: Ĝi naskiĝis en kliniko, doktoro.

FIGINSO (*mildiĝanta*): Ĝi rajtas, ĝi rajtas. (*Oni vidas lin ekzameni la lulilan internon, relevi la kapon, surprizita, uzi la stetoskopon kaj, perpleksa stariĝi. Li sin turnas al Duglaso kaj dum momento konsideras lin kun mieno esprimanta samtempe riproĉon kaj kompaton.*) Mi vere timas, sinjoro...hm...

DUGLASO: Templemoro.

FIGINSO: Jes... ke vi venigis min iomete malfrue.

DUGLASO (*tre kvieta*): Tion mi bone scias, doktoro.

FIGINSO: Kiel do?!

DUGLASO: De preskaŭ unu horo tiu infano mortis.

FIGINSO: Kaj nur nun vi venigas min!

DOUGLAS : Vous ne m'avez pas compris, docteur. Je l'ai piqué avec une forte dose de chlorhydrate de strychnine.

FIGGINS (*reculant, il renverse une chaise*) : Quoi ?... Mais... Mais... c'est un meurtre !

DOUGLAS : N'en doutez pas.

FIGGINS (*bégayant d'émotion*) : Mais vous... mais mais pourquoi... mais mais comment...

DOUGLAS : Je m'en expliquerai devant les Juges. Pour le moment, veuillez simplement faire le constat, docteur.

FIGGINS (*avec agitation*) : Il faut prévenir la police.

DOUGLAS : C'est déjà fait, docteur.

FIGGINS (*même jeu*) : La prévenir tout de suite. Où est le téléphone ? Comment ? Qu'est-ce qui est déjà fait ?

DOUGLAS : J'attends un inspecteur d'un instant à l'autre.

FIGGINS (*méfiant*) : Je vais l'appeler quand même, si vous permettez.

DOUGLAS : Mais bien sûr, docteur. Par ici. (*Sonnerie. Figgins s'immobilise. Douglas va à la rencontre du visiteur qui entre.*) L'inspecteur Mimms, sans doute.

MIMMS : Du district de Guildford, oui, monsieur.

DOUGLAS : Merci pour votre diligence, inspecteur.

MIMMS : Du tout... Ravi de vous connaître, monsieur Templemore, et de pouvoir vous rendre service. Je lis souvent vos articles dans le *Times*.

DUGLASO: Vi ne komprenis min, doktoro. Mi pikis ĝin per granda dozo de striknina klorhidrato.

FIGINSO (*malantaŭirante, li renversas seĝon*): Kion?... Sed... Sed... tio estas murdo!

DUGLASO: Ne dubu pri tio.

FIGINSO (*balbutante pro emocio*): Sed vi... sed sed kial... sed sed kiel...

DUGLASO: Mi klarigos tion antaŭ la juĝistoj. Por la momento, bonvolu simple konstati, doktoro.

FIGINSO (*kun perturbo*): Necesas averti la policon.

DUGLASO: Tio estas jam farita, doktoro.

FIGINSO (*sama ludo*): Tuj averti ĝin. Kie estas la telefono? Kiel do? Kio estas jam farita?

DUGLASO: Mi atendas inspektoron tre baldaŭ.

FIGINSO (*suspektema*): Mi tamen vokos ĝin, se vi permesas.

DUGLASO: Sed ja certe, doktoro. Tien. (*Sonoro. Figinso senmoviĝas. Duglaso iras al la vizitanto kiu eniras.*) Inspektoro Mimso, sendube.

MIMSO: De la distrikto de Gilfordo⁴, jes, sinjoro.

DUGLASO: Dankon por via diligenteco, inspektoro.

MIMSO: Por nenio... Ravita renkonti vin, sinjoro Templemore, kaj povi helpi vin. Mi ofte legas viajn artikolojn en la *Times*.

4 Gilfordo (Guildford) urbo sudokcidente de Londono.

FIGGINS (*d'une voix sifflante*) : Et c'est un journaliste par dessus le marché !

MIMMS (*se retournant*) : Oh, bonjour, docteur. C'est rare de vous voir si tôt levé. (*À Douglas.*) Qu'est-ce qui se passe ? On vous a cambriolé ?

FIGGINS : Cambriolé mon œil ! C'est un infanticide, inspecteur ! Cet homme a tué son enfant !

MIMMS : Vous, monsieur... ?! (*Douglas acquiesce de la tête. Au docteur.*) Infanticide... Vous en êtes certain ?

FIGGINS (*imitant une piqûre*) : Tué comme un chien. Strychnine.

MIMMS (*désorienté, à Douglas*) : Est-ce possible ! Vraiment, monsieur Templemore, je ne sais... il faut donc... oh là là, quelle histoire !

DOUGLAS : Allons, allons, inspecteur, remettez-vous.

MIMMS : Oui, oui... eh bien, dans ce cas... Puis-je voir la victime ? (*Douglas le mène au berceau. L'inspecteur se penche.*) Vous êtes sûr qu'il est tout à fait mort ? (*Figgins lève les bras au ciel avec une interjection étouffée.*) Bon... Bon.... (*À Douglas.*) Et... l'enfant est à vous ?

DOUGLAS : C'est mon fils, inspecteur.

MIMMS : Votre femme est là-haut ?

DOUGLAS : Je ne suis pas marié.

MIMMS : Ah... Mais alors... c'est...

DOUGLAS : Un enfant tout ce qu'il y a de naturel. Enfin, d'une certaine façon.

MIMMS : Alors où est la mère ?

FIGINSO (*per siblanta voĉo*): Kaj plue li estas ĵurnalisto!

MIMSO (*turniĝante*): Ho, bonan tagon, doktoro. Maloftas vidi vin tiel frue ellitiĝinta. (*Al Duglaso.*) Kio okazas? Ĉu oni domŝtelis vin?

FIGINSO: Domŝtelis, certe ne ! Temas tie pri infanmurdo, inspektoro! Tiu homo murdis sian infanon!

MIMSO: Ĉu vi, sinjoro ...?! (*Duglaso kapjesas. Al doktoro.*) Infanmurdo... Ĉu vi certas?

FIGINSO (*imitante pikon*): Mortigis kiel hundon. Striknino.

MIMSO (*perpleksa, al Duglaso*): Ĉu tio eblas? Verdire, sinjoro Templomoro, mi ne scias... do necesas... Holala, kia afero!

DUGLASO: Bone, bone, inspektoro, trankviliĝu.

MIMSO: Jes, jes... nu, tiukaze... Ĉu mi povas vidi la viktimon? (*Duglaso kondukas lin al la lulilo. La inspektoro kliniĝas.*) Ĉu vi certas ke ĝi estas tute morta? (*Figinsio levas la brakojn ĉielen kun mallaŭta ekkrio.*) Bone... Bone... (*Al Duglaso.*) Kaj... ĉu la infano esta via?

DUGLASO: Ĝi estas mia filo, inspektoro.

MIMSO: Ĉu via edzino estas supre?

DUGLASO: Mi ne estas edziĝinta.

MIMSO: Ha... Sed do... ĝi estas...

DUGLASO: Infano tute natura. Nu, iumaniere.

MIMSO: Kie do estas la patrino?

DOUGLAS : Au Zoo.
MIMMS : Pardon ?
DOUGLAS : La mère est au jardin zoologique.
MIMMS : Elle est employée là-bas ?
DOUGLAS : Non. Elle est pensionnaire.
MIMMS : Hé ?
DOUGLAS : Quartier des grands anthropoïdes.
MIMMS : Hé ?
DOUGLAS : Section du *Paranthropus erectus*.
MIMMS : Hé ?
DOUGLAS : Cage numéro 9. Vous la trouverez là. (*Médecin et policier échangent un regard et considèrent Douglas, inquiets sur sa santé d'esprit.*) Si le docteur veut bien examiner l'enfant d'un peu plus près, il relèvera sûrement quelques anomalies remarquables.
Après une seconde d'hésitation, Figgins va au berceau, soulève une couverture et des langes, qu'il rejette.
FIGGINS (*froid et furieux*) : Nom de Dieu.
Il saisit trousse et manteau et va pour sortir. Mimms le retient d'un geste.
MIMMS : Mais qu'est-ce qu'il y a, docteur ?
FIGGINS : Ce n'est pas un garçon, c'est un singe.
Fausse sortie.

DUGLASO: En la Zoo.
MIMSO: Pardonu?
DUGLASO: La patrino estas en la zoologia ĝardeno.
MIMSO: Ĉu ŝi tie estas dungita?
DUGLASO: Ne. Ŝi estas pensionanino.
MIMSO: He?
DUGLASO: Kvartalo de la grandaj antropoidoj.
MIMSO: He?
DUGLASO: Sekcio de *Parantropus erektus*⁵.
MIMSO: He?
DUGLASO: Kaĝo naŭa. Vi trovos ŝin tie. (*Kuracisto kaj policisto interŝanĝas rigardon kaj konsideras Duglason, malserenaj pri lia menssano.*) Se la doktoro bonvolas iom pli atente ekzameni la infanon, li certe notos kelkajn rimarkindajn nenormalaĵojn.
Post sekundo da hezito, Figinso iras al la lulilo, levas kovrilon kaj vindaĵojn, kiujn li elĵetas.
FIGINSO (*malvarma kaj furioza*): Diable.
Li ekprenas laborsaketon kaj mantelon kaj pretiĝas por foriri. Mims retenas lin per gesto.
MIMSO: Sed kio okazas, doktoro?
FIGINSO: Tio ne estas knabo, tio estas simio.
Ŝajna elsceniĝo.

5 *Paranthropus erectus* en la franca teksto.